# Laborplano

## por la estraro de Norvega Esperantista Ligo ekde 2026

proponata por la landa kunveno la 4-an de junio 2026

La laborplano validas ĝis la sekva landa kunveno.

## Gvidlinioj

### Akcepti kaj informi

La estraro formu kaj disvastigu informon konsiderante la ĉefan celgrupon: junajn norveglingvanojn. Ofte la sama temo povas esti prezentita kaj por membroj kaj por aliaj, sed la indaj emfazoj kaj anguloj estas malsamaj.

Ĉu homoj venas unuope, aŭ reprezentas amaskomunikilojn aŭ organizaĵojn, ambaŭkaze ili estu bonvenigataj kaj Esperanto estu prezentata por ili precize kaj sen troigoj.

### Kunvenigi kaj kunordigi

La estraro bonvenigu iniciatojn kaj bonajn ideojn, kaj kunlaborigu idehavantojn kun aliaj aktivuloj. La estraro precipe bonvenigu kaj kiel eble plej bone subtenu iniciatojn pri:

- kursoj
- lerno de instruado de Esperanto
- vortara laboro
- agado de kluboj
- agado de Norvega Junularo Esperantista
- kunlaboro kun nordiaj Esperanto-organizoj

## Labortaskoj

La estraro mem planu sian laboron, sed la planoj inkluzivu:

- Informi la celgrupon pri tio kio aktualas por ili, en maniero kiu interesas ilin, per kanaloj/komunikiloj kiuj frapas ilin.
- Informi kaj aktivigi la membrojn.
- Teni ĝustan kaj informplenan retejon, kun ligiloj al kursoj kaj alia informo.
- Teni la retpoŝtliston NEL-inform funkcianta.
- Eldonadi Norvegan Esperantiston kaj elektronikan novaĵleteron Esperanto-nytt
- Akceli intereson pri la internaciaj ekzamenoj.

## Esperantonia

La funkcioj kiun plenumas Esperantonia havas grandan valoron por la norvega Esperanto-movado, kaj devas esti prizorgataj kaj pluevoluigataj.

La parta forluigado de Esperantonia certigas la financan kaj organizan daŭrigpoveblon de la oficejo, kaj la estraro flegu bonan rilaton al niaj luantoj.

La estraro kunlabore kun lokuloj daŭrigu la komencitajn renovigadon kaj ordigadon de la ejo.